



onklo

Onklo Saliko de Ekparolu!, alinome Peter Weide el Danujo, rakontis pri sia onklumado al loka gazeto.

27.2.2018, s. 32

Halsnæs AVS

Traduko de la artikolo  
Peter Weide

## Mit liv som 'onkel'

Peter Weide, Hellekistevej 18,  
Melby

**ESPERANTO** Det startede i januar 2017. En ung hollænder blev min første nevø. Han ringede til mig som aftalt over skype og ville tale med mig. Fint nok, jeg havde jo været indforstået med at blive 'onkel'. Vores samtale varede, som aftalt, omkring 30 minutter.

Siden da har jeg haft samtaler med 43 'nevøer' - både mænd og kvinder, gamle og unge.

De fortæller om deres dagligdag, deres liv, om deres familie, hvad de arbejder med, hvordan studieforholdene er.

De spørger om mit liv, forholdene i Danmark. Nogle gange kommer vi ind på emner, som bliver nævnt i nyhederne. Nogle gange har vi alvorlige samtaler, andre gange griner vi meget.

Mine 'nevøer' bor i 13 forskellige lande. De fleste i Vest-europa, men jeg har også fået

opkald fra Estland, Kasakhstan, Rusland, Brasilien, Columbia, og Australien.

Hvordan finder de folk på at ringe til mig? De har lært esperanto. De fleste af dem på nettet. Lernu.net og duolingo har nok de fleste esperanto-elever.

Efter gennemgang af et begynderkursus mangler folk ofte nogen at tale med. Derfor har Katalin Kovats på sin hjemmeside edukado.net etableret en formidlingsservice.

Lige for tiden er jeg én ud af 61 'onkler' m/k.

Vi står til rådighed, når en nyudklækket esperanto-elev mener, at nu vil han/hun aktivere det lærte. Eleven kan så i første omgang få 10 samtaler med 'onkler' og dermed lære sproget ikke kun skriftligt, men også ved at tale og, ikke mindst, at lytte til forskellige stemmer.

Lige for tiden er der 'nevøer' fra 41 lande. Sjovt at landet med det største antal 'nevøer' er USA.

## Mia vivo kiel „onklo“

La afero komenciĝis en Januaro 2017. Juna nederlandano fariĝis mia unua nevo. Li vokis min kiel interkonsentite pere de skajpo kaj deziris paroli kun mi. Tute en ordo, mi ja estis konsentinta fariĝi „onklo“. Nia konversacio daŭris, kiel planite, proksimume 30 minutojn.

De post tio mi babilis kun 43 „nevoj“, viroj kaj virinoj, maljunaj kaj kunaj. Ili rakontas pri siaj ĉiutagaj vivoj, pri la familioj, siaj laboroj aŭ kondiĉoj por universitata studado. Kelkfoje ni tuŝas temojn, pri kiuj ni aŭdis en la novaĵoj. Kelkfoje la konversacioj estas seriozaj, kelkfoje ni multe ridas. Miaj „nevoj“ loĝas en 13 diversaj landoj. La plej multaj en okcidenta Eŭropo, sed mi ricevis vokojn ankaŭ el Estonujo, Kazahŭjo, Rusujo, Brazilo, Kolombio kaj Aŭstralujo.

Kiel tiuj homoj venas al la ideo telefoni al mi? Ili lernis Esperanton. La plej multaj el ili per la interreto. Lernu.net kaj Duolingo probable havas la plej multajn esperantolernantojn. Post la finstudado de komenca kurso homoj ofte malhavas iun, kun kiu ili povas paroli. Tial Katalin Kovats sur sia hejmpaĝo edukado.net lanĉis perilon. Momente mi estas unu el 61 „onkl/in/oj“.

Ni estas je dispono, kiam novbakita komencanto opinias, ke nun li/ŝi volas aktivigi la lernitan materialon. La lernanto povas mendi 10 konversaciojn ĉe „onklo“ kaj per ili lerni la lingvon ne nur skribe, sed ankaŭ per la parolado, kaj, ne malgrave, per aŭskultado al diversaj voĉoj. Momente la sistemo montras „nevojn“ el 41 landoj. Amuze, ke la lando kun la plej multaj „nevoj“ estas Usono.